



EKO 2018-14 sendita el Góra, Pollando, la 21an de majo

Pollando reenAMIĝas trian fojon en la regiono de Wrocław

Jen la trian fojon, tiu parto de Pollando gastigas seminarion de UEA pri Aktivula Maturigo. La 47a AMO-seminario ekis en la 21a de majo en Góra kaj Czernina, proksimaj al Wrocław. Unuafoje AMO traktas rekte la temon de kulturo kaj la artoj, kun la titolo: 'La artoj serve al Esperanto -- Esperanto serve al la artoj'. Jen refoje la skemo por la seminario.

La artoj serve al Esperanto

1. La nuna kultura sceno en Esperantujo.
2. La rolo de Universalaj Kongresoj en stimulo de la artoj.
3. La roloj de kulturaj festivaloj kaj aliaj renkontiĝoj.
4. Perspektivoj kaj defioj por artistoj en Esperantujo.
5. La malfacilaĵoj specife por la teatra arto.
6. La rolo de la parolaj artoj kontraste al neparolaj.

Esperanto serve al la artoj

1. La reputacio de Esperanto en artismaj rondoj.
2. Esperanto kiel pontolingvo por literaturo kaj aliaj artoj.
3. Sukcesaj iniciatoj tra la lastaj jaroj.
4. Kulturaj eksteraj rilatoj por esperantistoj.
5. Favoraj kondiĉoj por tia kunlaboro.
6. Subvenciaj ebloj por arta agado en aŭ pere de Esperanto.

Dudeko da homoj partoprenis la kunsidon, sed el tiuj nur deko havis la lingvan aŭ artistan nivelojn por aktive interveni en la diskutadon. Sed inter ili renomaj artistoj el niaj rondoj. Jen konkludoj:

1. Kantado kaj muziko en Esperanto prosperas.
2. Teatro malprosperas pro financaj kialoj kaj la manko de reguleco.
3. Gravas UK pro la skalo kaj buĝeto; same gravas kulturaj festivaloj ks. por ebligi oftecon.
4. Ni donu prioritatojn al la parolaj artoj.
5. Artoj povas ludi valoran rolon en la instruado de Esperanto.
6. Artoj malfermas multajn pordojn por trarompi la verdan kurtenon kaj elpaŝi antaŭ pli granda publiko.
7. Pli malgrandaj urboj tendencas doni pli fortan atenton al kulturo en kaj per Esperanto.
8. Pli malgrandaj lingvoj aparte bonvenigas la rolon de Esperanto kiel pontolingvo inter literaturoj.

La resumo de la seminario okazos en la 22a de majo kadre de la 4a Internacia Simpozio. Praktika sekvo: la AMO-seminario okazis en la urba biblioteko de Czernina, kiu kvankam servanta etan urbon estas bonege ekipita kaj signife subtenas Esperanton. La instancoj urbaj kaj bibliotekaj konsentis surloke, ke ili subtenos la starigon de E-kurso en la urbo – instruisto por tio troviĝas.

Antaŭaj AMO-seminarioj okazis en Wroclaw en 2016 en la IJK, kaj en 2017. La 47an seminarion gvidis Stefan MacGill, kiu ene de unu tago partoprenis la 6an Internacian Kantfestivalon, kaj la inaŭguron de la jubilea 70a fervojista kongreso de IFEF, kie li salutis kiel la vic-prezidanto de UEA. Notinde, ke la temaro de la ĵusa seminario reaperos en la Kleriga Lundo de la UK en Lisbono, aldone al la 50a AMO-seminario pri rembrovarbado.

Vortoj: 465



Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/). Aperintaj komunikiloj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.